| Verboj netransitivaj | | Verboj transitivaj | |
|---|---|---|---|
| Verboj unu-valentaj → | Verboj unu-valentaj | Verboj du-valentaj | Verboj tri-valentaj |
| **-iĝas -o = ek-as -o** | **-as -o** | **-o -igas -on** | |
| Varmiĝas la akvo.<br>(= Ekvarmas la akvo.)<br>Sidiĝas la promenantoj.<br>(= Eksidas la promenantoj.)<br>Estiĝis kafo-paŭzo.<br>(= Ekestis kafo-paŭzo.)<br>Mankiĝas pano.<br>(= Ekmankas pano.) | Varmas la akvo.<br>(= La akvo estas varma.)<br>Sidas la promenantoj.<br>Estas kafo-paŭzo.<br>Mankas pano. | Ŝi varmigas la akvon.<br>La promenantoj sidigas sin.<br>Laciĝo sidigas la promenantojn.<br>Oni estigis kafo-paŭzon.<br>Troa manĝemo de la gastoj mankigas panon. | |
| | **-iĝas -o.** | **-o -as -on** | **-o -igas -on al -o** |
| | Manĝiĝis pomoj.<br>Aĉetiĝis ĉiuj biletoj.<br>Karlo naskiĝis sur monto.<br>Aŭdiĝis birdokantoj. | La infanoj manĝis pomojn.<br>La publiko aĉetis ĉiujn biletojn.<br>Karlon naskis lia patrino sur monto.<br>La promenantoj aŭdis birdokantojn. | La patrino manĝigis pomojn al siaj infanoj.<br>Reklamo aĉetigis ĉiujn biletojn al la publiko.<br>Falo de lia patrino naskigis Karlon sur monto.<br>La gvidisto aŭdigis birdokantojn al la promenantoj. |

Gaconda Metodo. Instru-afiŝaro: Verboj netransitivaj kaj transitivaj kolora.